




Azeninfano

Donkey Child

 Lindiwe Matshikiza

 Meghan Judge

 dohlam

 3

 Esperanto / English



Estis knabineto kiu unue vidis la misteran formon en la malproksimo.

...

It was a little girl who first saw the mysterious shape in the distance.



Kiam la formo proksimiĝis, ŝi vidis ke ĝi estas tre graveda virino.

...

As the shape moved closer, she saw that it was a heavily pregnant woman.



Sinĝena sed kuraĝa, la knabineto proksimiĝis al la virino. “Ni devas teni ŝin kun ni,” la popolo de la knabineto decidis. “Ni gardos ŝin kaj ŝian infanon sekure.”

...

Shy but brave, the little girl moved nearer to the woman. “We must keep her with us,” the little girl’s people decided. “We’ll keep her and her child safe.”



La infano baldaŭ ekvenis. "Puŝu!" "Alportu kovrilojn!" "Akvo!" "Puuuuuŝŝŝŝuuu!!!"

...

The child was soon on its way. "Push!" "Bring blankets!" "Water!" "Puuuuusssshh!!!"



Sed kiam ili vidis la infaneton, ĉiuj saltis malantaŭen
ŝokite. "Azeno?!"

...

But when they saw the baby, everyone jumped back
in shock. "A donkey?!"



Ĉiuj ekdisputis. “Ni diris ke ni gardus la patrinon kaj la infanon sekure, kaj tion ni faros,” diris iuj. “Sed ili alportos al ni malbonŝancon!” diris aliuloj.

...

Everyone began to argue. “We said we would keep mother and child safe, and that’s what we’ll do,” said some. “But they will bring us bad luck!” said others.



Kaj tiel la virino trovis sin sola denove. Ŝi demandis sin, kion ŝi faru kun tiu stranga infano. Ŝi demandis sin, kion ŝi faru kun si mem.

...

And so the woman found herself alone again. She wondered what to do with this awkward child. She wondered what to do with herself.



Sed finfine ŝi devis akcepti ke li estas ŝia infano kaj ŝi estas lia patrino.

...

But finally she had to accept that he was her child and she was his mother.



Nu, se la infano restis same malgranda, ĉio eble okazus alie. Sed la azeninfano grandiĝis kaj grandiĝis, ĝis li ne plu trovisi lokon sur la dorso de sia patrino. Kaj kiom ajn li klopodis, li ne povis konduiti sin kiel homo. Lia patrino estis ofte laca kaj ĉagrenita. Iufoje ŝi devigis lin fari bestan laboron.

...

Now, if the child had stayed that same, small size, everything might have been different. But the donkey child grew and grew until he could no longer fit on his mother's back. And no matter how hard he tried, he could not behave like a human being. His mother was often tired and frustrated. Sometimes she made him do work meant for animals.



Konfuzo kaj kolero kreskiĝis en Azeno. Li ne faru ĉi tion kaj li ne faru tion ĉi. Li ne kondu tu sin tiel kaj li ne kondu tu sin tiel. Li tiel koleriĝis ke iutage li piedbatis sian patrinon al la tero.

...

Confusion and anger built up inside Donkey. He couldn't do this and he couldn't do that. He couldn't be like this and he couldn't be like that. He became so angry that, one day, he kicked his mother to the ground.



Azeno pleniĝis de honto. Li forkuris tiom malproksimen kaj tiom rapide kiom li povis

...

Donkey was filled with shame. He started to run away as far and fast as he could.



Kiam li ĉesis kuri, estis jam nokto, kaj Azeno perdiĝis. "I-a?" li flustris al la mallumo. "I-a?" ĝi resonis al li. Li estis sola. Li buklis sin strikte en pilkoformo kaj eniris profundan kaj maltrankvilan dormadon.

...

By the time he stopped running, it was night, and Donkey was lost. "Hee haw?" he whispered to the darkness. "Hee Haw?" it echoed back. He was alone. Curling himself into a tight ball, he fell into a deep and troubled sleep.



Azeno vekiĝis kaj vidis strangan maljunulon, kiu fikse rigardis lin desupre. Li rigardis en la okulojn de la maljunulo kaj eksentis iom da espero.

...

Donkey woke up to find a strange old man staring down at him. He looked into the old man's eyes and started to feel a twinkle of hope.



Azeno restis kun la maljunulo, kiu instruis lin pri multaj diversaj manieroj vivteni sin. Azeno aŭskultis kaj lernis, samkiel la maljunulo. Ili helpis unu la alian, kaj ili kune ridis.

...

Donkey went to stay with the old man, who taught him many different ways to survive. Donkey listened and learned, and so did the old man. They helped each other, and they laughed together.



Iun matenon la maljunulo petis Azeno-n porti lin al montopinto.

...

One morning, the old man asked Donkey to carry him to the top of a mountain.



Alte inter la nuboj ili dormiĝis. Azeno sonĝis, ke lia patrino malsanas kaj vokis lin. Kaj tiam li vekiĝis...

...

High up amongst the clouds they fell asleep.
Donkey dreamed that his mother was sick and calling to him. And when he woke up...



... la nuboj estis malaperintaj, kune kun lia amiko, la maljunulo.

...

... the clouds had disappeared along with his friend, the old man.



Azeno finfine sciis, kion fari.

...

Donkey finally knew what to do.



Azeno trovis sian patrinon, solan kaj funebrantan sian perditan infanon. Ili fikse rigardis unu la alian longtempe. Kaj tiam forte brakumis unu la alian.

...

Donkey found his mother, alone and mourning her lost child. They stared at each other for a long time. And then hugged each other very hard.



La azeninfano kaj lia patrino kreskis kunen kaj trovis multajn manierojn vivi kune. Iom post iom aliaj familioj ekloĝis ĉirkaŭe.

...

The donkey child and his mother have grown together and found many ways of living side by side. Slowly, all around them, other families have started to settle.



Global Storybooks

globalstorybooks.net

Azeninfano

Donkey Child

 Lindiwe Matshikiza

 Meghan Judge

 dohlam (eo)

